

El la letero al d'Alembert de J.J. Rousseau
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 785, 1978.10.26 & 28

Cl.- Salutas vin Claude kaj Andrée Gacond.

La 5-an de septembro la fondumo Gastejo Edmond Privat (GEP) aĉetis en la urbo La Chaux-de-Fonds au domojn, kiujn ĝi iom post iom transformos por ke ili fariĝu agrabla restadcentro por studemaj esperantistoj. La 2-an de decembro, komence de kultura semajnfino, tiuj ĉi domoj ricevos la nomojn de Ernest Naville kaj Pierre Bovet. En venontaj prelegoj ni raportos pri la penso kaj aktiveco de tiuj esperanto-pioniroj, kiujn Edmond Privat multe aprezis.

A.- Sed unue, kiam stariĝas en La Chaux-de-Fonds renkontiĝejo, kiu povos allogi la esperantistojn el la tuta mondo, estas eble interese diri kelkajn vortojn pri la kultura karakterizaĵo de tiu ĉi urbo kaj de ties ĉirkaŭaĵo.

Cl.- Jam situante je alteco de pli ol mil metroj super la marnivelo La Chaux-de-Fonds originale distingiĝas de la aliaj eŭropaj urboj, kiuj ĝenerale preferas la ebenajojn al la montaj valoj. La Chaux-de-Fonds kreskis, kie la fruktarboj rifuzas tion fari. La malmilda klimato devigis ties loĝantojn interesiĝi pri io alia ol agrokulturo. La longaj neĝaj vintroj, kiuj ofte komenciĝas jam en oktobro por finiĝi nur meze de aprilo, estis devigo al komforto: vi ne povas frost-tremi dum ses monatoj au eĉ pli longe, ĉar ankaŭ la bela sezono ne tre varmas !

A.- Jen la stranga loko, kiun elektis Gastejo Edmond Privat por ek-allogi la esperantistojn.

Cl.- Kutime en malmildaj montaraj regionoj meldensas la loĝantaro, sed tiurilate la Neŭŝatela Montaro estas escepto en la hom-geografio, kiel fakte ĝi estas spitema kontraŭ aliaj normoj. Fakte jam ekde la deksepa jarcento svarmas la larĝtegmentaj farmdomoj longe de la valoj orientitaj al ĉiuj ventoj, ĉu la okcidenta pluv- aŭ neĝ-ema kaj ĉu la bizo blovanta el nord-oriento.

A.- Kaj kiam senmovas la aero tiuj ĉi uj-formaj valoj sen defluiloj pleniĝas je ĉiam pli malvarma aero, ĉefe dumvintre malgraŭ la bela suno. La valoj La Sagne kaj La Brévine estas eĉ konataj, kiel svisa Siberio kun siaj 20 aŭ 30 gradoj sub nul dum la vintraj malvarmoj, kaj la rivero Doubs, kiu formas plurkilometran lagon en kanjona valo antaŭ ol fariĝi akvofalo kun la nomo Saut du Doubs frostas dum la vintro je la ĝojo de la sketemuloj.

Cl.- Ni scias, per skribaĵo, ke jam en 1330 vivis en la domaro La Chaux-de-Fonds kelkaj kamparanoj. En 1480 la Chault de Font ricevis de la Grandsinjoro loĝanta aliflanke de la monto en Valangin senimpostan ĉarton. Ekde tiam almigris homoj serĉantaj iom da libereco, kaj formiĝis tre demokratecaj vivkutimoj, kio tre rapide sentigis la bezonon intimiĝi kun la legarto. Tiurilate la adopto de la protestanta kredo en 1536 ludis decidigan rolon. La kamparanoj ĉiutage grupiĝis familie por laŭtlegi la biblion kaj ĝin komentarii.

A.- Baldaŭ aliaj legaĵoj, unue religiaj, sed pli kaj pli profanaj, najbaris kun la sankta libro. Kun ili alvenis novaj ideoj, sciencaj konoj, intereso pri la aliaj landoj, ktp. Post malpli ol unu jarcento la vizitantoj miros pri la klereco de tiuj ĉi kamparanoj, kies ĉef-okupo pli kaj pli estos hejma man-aktiveco: la virinoj puntis, la viroj skulptis kaj fabrikis lignajn murhorloĝojn kaj ĉiam pli precizajn risortajn poŝhorloĝojn.

Cl.- Kiam la juna Jean-Jacques Rousseau migradis tra la regiono, la miraklo estis okulfrappe videbla. El lia promenado en la vilaĝo La Chaux-de-Fonds aŭ eble en la valo Travers li konservas la tutan vivon idealigitan rememoron. Jen kiel li priskribas en 1758 sian tiaman impreson pri la montanoj en sia fama letero al d'Alembert:

A.- Mi memoras esti vidinta en mia junaĝo proksime de la urbo Neuchâtel spektaklon sufiĉe agrablan kaj eble unikan sur la tero, tutan monton kovritan de loĝdomoj, ĉiu el ili estanta la centro de la dependa bieno; tiel ke ĉi tiuj domoj, egale distancaj kiel la riĉaĵoj de la posedantoj, samtempe proponas al la multaj loĝantoj de tiu ĉi monto la kvieton de la retiriĝo kaj la agrablon de la societa vivo. Ĉi feliĉaj kamparanoj, ĉiuj bonhavaj, liberaj je taliado, iropoŝtoj, voktoj, deĵoroj, kultivadas plej zorgeme bienojn, kies produktado estas ilia, kaj dediĉas la ripoztempon, kiun la kultivado lasas al ili, por fari mil manverkojn kaj por disvolvi la inventemon, kiun la naturo al ili donacis.

Cl.- "Ĉefe dumvintre, periodo kiam alta neĝtavolo senigas ilin je rapida komunikado, ĉiu bone hejtite enfermita kun mult-ana familio en sia plaĉa kaj pura lignodomo, kiun li mem konstruis, sin dediĉas al mil amuzaj laboroj, kiuj forpelas enuon el ties rifuĝejo kaj pliigas lian bonfarton. Neniam profesiaj lignaĵisto, seruristo, vitristo aŭ tornisto eniris la landon; ĉiuj estas tio por si mem, neniu por aliulo; je la multeco de la praktikaj kaj eĉ elegantaj mebloj, kiuj konsistigas ilian havaĵon kaj ornamas ilian hejmon, oni ne vidas unu, kiu ne estis ellaborita de la manoj de la dommastro.

A.- "Ankoraŭ restas al ili ripoztempo por inventi kaj fabrikigi mil malsimilajn instrumentojn el ŝtalo, ligno, kartono, kiujn ili vendas al fremduloj, el tiuj pluraj alvenis eĉ ĝis Parizo, interalie tiuj horloĝetoj el ligno, kiujn oni tie vidas ekde kelkaj jaroj. Ili fabrikas ilin ankaŭ el fero; eĉ poŝhorloĝojn ili faras; kaj, kio ŝajnas nekredebla, ĉiu kunigas en si mem la varian profesion, en kiu subdividiĝas la horloĝfarado, kaj mem fabrikas ĉiujn laborilojn.

Cl.- "Ne estas ĉio: ili posedas utilajn librojn kaj estas sufiĉe kleraj; ili saĝe diskutas pri ĉio, kaj pri multaj temoj kun sprito. Ili fabrikas sifonojn, magnetojn, okulvitrojn, pumpilojn, barometrojn, senlumajn kamerojn; iliaj murornamaĵoj estas multeco da iloj ĉiuspecaj: vi prenis la hejto-fornon de kamparano por mekaniko-metiejo kaj por serĉejo pri eksperimenta fiziko.

A.- "Ĉiuj kapablas iom desegni, pentri, kalkuli; la plimulto flutludas; pluraj lertetas en muziko kaj kantas ĝuste. Tiuj artoj ne estas instruataj al ili de instruistoj, sed iel akiriĝas tra la tradicio. De tiuj, kiujn mi vidis praktiki muzikon, unu diris esti ĝin lerninta de la patro, alia de onklino, alia de kuzo, kelkaj kredis, ke ĝin ili ĉiam konis. Unu el iliaj plej oftaj amuzoj estas kanti kun la virinoj kaj la gefiloj kvarvoĉajn psalmojn; kaj oni ĉiam miras, kiam aŭdiĝas el tiuj ĉi kampdomoj la vigila kaj vira harmonio de Goudimel jam ekde tiom longe forgesita de niaj ĉionsciantaj artistoj..."

C1.- "...Mi senĉese admiradis en tiuj neordinaraj homoj mirigan miksaĵon de delikateco kaj de simpleco, kiujn oni kredus preskaŭ neakordigeblaj kaj kiujn mi neniam observis aliloke."

A.- Povas esti, ke Jean-Jacques Rousseau troigis siajn laŭdojn kaj idealigis la montanojn. Tamen aliaj turistaj raportoj de la dekoka jarcento abundas je similaj mirigitaj priskriboj pri la leg-kapablaj kamparanoj de la Neŭŝatela Montaro, kiuj mem forĝis sian penson dum la man-laboraj meditadoj, kiuj metis ilin en intiman kontakton kun artefaritaĵoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis al vi Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!